

Esperanto-parlamento en israela televido

Lastatempe esperantistoj en Israelo rikoltis plurajn atingojn, sed la plej impona estas duonhora televida elsendo pri Esperanto.

Temas pri debato kiu estis elsendita la 9-an (kaj la 12-an) de decembro kadre de la soci-kultura programo “Strata parlamento”, en la parlamenta kanalo de la Israela televido.



Partoprenantoj de la kvina Komuna Israela Esperanto-Semajnfino en Jerusalemo.

Debatis kvin aktivaj esperantistoj kiuj prezentis E-on el la persona kaj socia vidpunktoj: la iniciatinto de la projekto Eran Vodevoz, instruistino Nava Cinori, komputilisto kaj Esperanto-kursgvidanto Gian Piero Savio, kaj UEA-estrarano Prof. Amri Wandel kaj lia filino Tali. Ĉiuj partoprenantoj entuziasme rakontis pri siaj internaciaj amikecoj, kontaktoj kaj vojaĝoj per Esperanto. Oni debatis principajn demandojn kiel *Ĉu Esperanto sukcesis?* kaj *Esperanto kaj paco*, sed ankaŭ prezentis praktikajn uzojn de Esperanto kiel la Delegita Reto, Esperanto en la Interreto kaj Esperanto en la familio, kaj eĉ lingvo-politikajn aspektojn kiel *Esperanto kaj la angla* kaj *La Akademio de Esperanto*.

Anonco pri la televida elsendo kun favora teksto pri Esperanto aperis en la ĉefa paĝo de *Tapuz* – la plej granda Israela interreta portalo, kie daŭre ekzistas tre aktiva forumo pri *Esperanto – lingvo kaj kulturo*. La sama programo estos elsendata ankaŭ en du francaj televid-kanaloj.

Alia lastatempa sukceso de la Esperanto-movado en Israelo estis la kvina Komuna Israela Esperanto-Semajnfino (KIES), kiu okazis fine de novembro en Jerusalemo.

Ripetante la sukcesan formulon de la antaŭaj KIES-oj (vd. *Esperanto*, aprilo 2004) tridek kvin esperantistoj ĝuis abundan du-tagan programon de ekskursoj, vizito de scienca muzeo, prelegoj, lingvaj ludoj kaj komputilaj prezentaĵoj.

Amri Wandel